

Ĝemeligo de urboj kaj vilaĝoj

Claude Gacond, 75-a radioprelego, 1964.05.06 & 09

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtunda Radiostacio. Claude Gacond raportas pri la ĝemeligo de urboj kaj vilaĝoj.

De tempo al tempo vi certe aŭdis paroli pri la ĝemeligo de komunumo kun komunumo de alia lando. Via urbo eble jam ĝemeliĝis. Via vilaĝo eble akceptus ĝemeliĝi kun afrika vilaĝo malpli privilegiita.

Se hodiaŭ ni parolas pri tiu temo : ĝemeligo de komunumoj, tio estas, ĉar inter la movadoj, kiuj laboras al kreiĝo de tutmonda opinio kapabla influi la internacian politikon kaj ludi rolon sur la decidojn de la ŝtatestroj kaj diplomatoj, la movado **Monda federacio de la ĝemeligitaj civitoj** plenumas gravegan rolon.

Nun per ĝi pli ol 41 milionoj da loĝantoj, apartenantaj al pli ol 700 komunumoj en 45 landoj, kunlaboras por konstrui pli homecan mondon. Mi havas antaŭ la okuloj du fotografiaĵojn. Sur la unua oni vidas knabeton terurigitan de mitraletoj, kiujn naziaj S.S.-soldatoj direktas sur lin. Kun miloj da aliaj judoj de la varsovia getto li marŝas al la morto. La dua fotografiaĵo prezentas alian knabon, kiu ankaŭ marŝas kun miloj da aliaj homoj. Li marŝas ĝoje kaj kun fido en la vivo, ĉar lia urbo Le Locle en Svislando ĝemeliĝas kun la senegala urbo Kaolak. Du senkulpaj knaboj. Du infanaj vizaĝoj. Unu kie esprimiĝas suferiga angorego. Alia kie esprimiĝas la fiero marŝi en bela kunirantaro.

Sur tiuj bildoj oni povas legi : « *Nia jarcento murdis infanojn ! Ĉu ĝi nun ne devus konstrui pacon, por ke ĉiuj infanoj de la mondo kresku en ĝojo ?* »

Tiun alvokon ni ĉiuj jam aŭdis multfoje. Laŭ la respondo, kiun ni individue kaj kolektive alportos al ĝi per konstruaj agoj, murdo de infanoj plu daŭros sur la tero aŭ paco konstruiĝos.

La 27-an de aŭgusto 1951 Jean-Marie Bressand, memore al sia forkuro el la milita punrestadejo Compiègne la 27-an de aŭgusto 1943, fondis, kun grupeto de rezistintoj, la francan asocion Le **Monde bilingue** [Dulingva Mondo]. De tiam tiu movado celas mondiskalan dulingvismon sur la bazo de la lingvoj angla kaj franca.

Tiu dulingvismo, kiu volis eviti pritrakti la demandon Esperanto, ne sukcesis. Tamen el ĝi io tre konstruiga sukcesis : tio estas la ĝemeligo de urboj. De 1953 la movado Monda dulingvismo, por konkretigi sian agadon, iniciatis kulturajn ĝemeligojn inter fremdlandaj urboj. S-ro J.-M. Chevallier, la nuna prezidanto de la movado, estas tiu, kiu ellaboris kaj iom post iom precizigis la doktrinon de tiuj ĝemeligoj inspirataj de strikta egaleco.

Preni homon en lia komunumo. Permesi al tiu homo vivi personan kaj senperan kontakton kun aliaj homoj, civitanoj el aliaj urboj. Konsciigi al ĉiuj tiuj homoj per tiu kontakto ilian interdependecon. Resume : krei, sur vera homa fundamento, tuthomaran fratan societon, jen la agada ideo de la iniciatintoj de la ĝemeligo de urboj. Dum dek jaroj realigoj precizigis, pli larĝigis kaj firmigis tiun idealon.

Kiam tiu movado, kiu naskiĝis en Eŭropo, disvastiĝis al Afriko, ĝi kapablis asocii eŭropanojn kaj afrikanojn al komuna tasko en perfekta egaleco liberigita de ĉia politika antaŭkondiĉo. Tiam naskiĝis la kooperaj aŭ kunlaboraj ĝemeligoj, kiuj hodiaŭ montriĝas kiel unu el la plej fekundaj metodoj elimini sekvaĵojn de la kolonia erao, senpolitigi interŝanĝojn, homigi teknikan helpon, disvastigi klerigon kaj ĝeneraligi ekonomiajn progresojn. Tio ne estas malmulto en epoko, kie la helpo al subevoluintaj landoj fariĝas ĉiam pli urĝa.

La ĝemeligo de komunumoj montriĝas iom post iom decidiga faktoro, kiu psikologie influas la kunlaborantajn loĝantarojn pensi sian ekonomion kaj kulturon tutplanede.

Sed vi diras « *Kiel naskiĝas ĝemeligoj ?* »

Jen do kelkaj sciigoj tiurilate. Ili eble sonoros al viaj oreloj kiel alvoko al ekago.

Ĝemeligo de urboj kaj vilaĝoj

Claude Gacond, 75-a radioprelego, 1964.05.06 & 09

Kiam oni observas la ĝemeligon de komunumoj, oni konstatas, ke starte troviĝas homo decidata agi. Li studis la dokumentojn ricevitaĵojn de la movado **Monda federacio de la ĝemeligitaj civitoj**, li lanĉis en sian urbon aŭ vilaĝon la ideon pri ĝemeligo, li konvinkigis sian urbestron kaj kelkajn personojn aĝemajn en diversaj societoj: fanfaroj, klerigaj movadoj, politikaj partioj, ekonomiaj kaj komercaj medioj, ktp.

Informita, la komunuma estraro diskutas. Ĝi decidas aliĝi al la movado kaj ricevas liston de aliaj komunumoj, kiuj deziras ĝemeliĝi. Komitato estas kreita. Ĝi grupigas virojn kaj virinojn el ĉiuj sociaj tavoloj. Ĝi diskutas unuan ĝemeliĝon kaj trovas la financajn rimedojn ĝin efektiviĝi.

Post kelkaj monatoj aŭ jaroj, laŭ la lokaj cirkonstancoj, impona kunirantaro marŝados al la urbodomo: ĝi grupigos la urbajn aŭtoritatojn, la ĝemeligan komitaton, folklorajn kaj muzikajn grupojn, lokajn societojn, florigitajn ĉarojn, infanojn de la lernejoj, ktp.

Solena ceremonio antaŭ la urbodomo sigelos la ĝemeliĝon. Estos nova paŝo al la paco. Estos progreso al la kooperado inter la homoj. La strikta observado de la principoj de la **Ĉarto de la ĝemeligitaj civitoj** donos al tiu kunlaboro ŝancojn daŭri kaj efiki longe.

El tiu ĝemeligo rezultos konkretaj agoj. Kiam ekzemple afrika urbo aŭ vilaĝo ĝemeliĝas kun eŭropa komunumo, tiam troviĝas tuj multaj eblecoj pri kunlaboro. Lernejoj, administrejoj, fabrikoj invitas nigrajn gejunulojn por staĝoj perfektigaj; blankaj gejunuloj iras al la afrika komunumo dum kelkaj monatoj aŭ eĉ jaroj por alporti konstruan kaj plej ofte senpagan helpon. Jaron post jaro la personaj kontaktoj plimultiĝas. La societoj invitas reciproke kelkajn personojn de la ĝemela urbo al siaj manifestacioj. Civitanoj de la privilegiita komunumo alvenas al la ideo je mona helpo al la malpli privilegiita ĝemela komunumo.

Antaŭ la ekzisto de tiuj urbaj ĝemeligoj, pri la internaciaj aferoj sole decidis la granduloj de nia mondo, la registaroj kaj la diplomatoj. Nun la ĝemeligitaj komunumoj komencas partopreni en la internacia agado. Ili aŭdigas la voĉon de la civitanoj, kie ĝis hodiaŭ ĉefe estis aŭdataj la voĉoj de potencaj ŝtatestroj.

Se vi skribos al Radio-Svislando en Berno, vi povos ricevi belan broŝuron, kiu raportas pri la ĝemeligo de la civitoj. En la franca ĝi titoliĝas **Le jumelage des villes**, en la angla **Town twinning** kaj en la germana **Städte Partnerschaften**. Do en via letero menciuj, en kiu lingvo vi ŝatus ricevi la dokumenton. Kaj en via loka grupo ekzamenu, kion vi povus fari por helpi la ĝemeligon de via komunumo kun aliaj komunumoj, kiuj bezonas kaj atendas vian helpon.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la ĝemeligo de urboj kaj vilaĝoj.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-